

AUGUST STRINDBERG - SVEDA VERKISTO KUN INTERNACIA FAMO

Rektoro KARL SÖDERBERG

Prelego farita en I.S.U., Munkeno, 1951

Ne estas eble kapti la fulmon per la mano aŭ kalkuli la sablerojn sur la fundo de la maro. Preskaŭ same malfacile ŝajnas al mi en mal-longa prelego doni akcepteble kompletan kaj justan koncepton pri tiu komplika kaj malfacile komprenebla homo, kies nomo estis August Strindberg. Jam la amplekso de lia produktado, kies ĉefparto aperis en eldono de 55 grandaj volumoj, nebligas pli detalan priskribon. Krome liaj vivo kaj verkaro estas plenaj de kontrastoj. Strindberg estis la unua kaj la ĉefa reprezentanto de la beletra naturalismo en Svedlando, sed samtempe li verkis rakontojn kaj fabeldramojn kiujn karakterizas la plej delikata romantiko. Senrespekte kaj maltime li atakis la samtempajn sociajn cirkonstancojn sed li ankaŭ montris multajn konservativajn kaj eĉ reakciemajn trajtojn. Dum longaj periodoj li konfesis sian simpatian por la socialismo kaj batalis por la libereco, egaleco kaj frateco de nacioj kaj individuoj por pli poste akcepti la doktrinon de Nietzsche pri la superhomo, la intelekta aristokrato. Unue blasfemanto pri la eklezio kaj la kristana dogmaro li post sensacia t.n. konvertiĝo rapide alprenis pli modestan tonon kaj en kelkaj romanoj aperis eĉ kiel religia mistikulo. Jen li eksplodigis sian koleron kaj sian malamon kontraŭ la virinoj, jen li apoteozis ilin kiel patrinon, fratinton, amantinton, kaj li mem edziĝis tri fojojn. Li naskiĝis en grandurbo, sed kiel apenaŭ iu alia svedo li pentris la naturon kaj la homojn de la kamparo kaj precipe de la marborda insularo. En Strindberg do troviĝis kvazaŭ aro da malsimilaj homoj, kiuj jen superregis sur la scenejo kaj agadis proksime al la planklumo, jen tute malaperis en la kulisojn — por prunti bildon el lingvo kiun Strindberg mem plene majstris.

August Strindberg estis klare konscia pri la interbatalantaj elementoj de sia propra karaktero, kaj li provis klarigi tiun vivodaŭran konflikton el sia deveno. Lia patrino laboris kiel servistino kaj gasteja helpantino, antaŭ ol ŝi edziniĝis al la spicvendisto, poste vaporŝipa agento Carl Oscar Strindberg, la patro de la verkisto. Sub la influo de la tiutempe modernaj teorioj pri heredeco Strindberg vidis la kaŭzon de la konflikto inter la „sklava sango” kaj la superklasa instinkto en si en sia deveno de patrino el la proletaro kaj etburĝe aristokrata patro. En tiu tipe sveda mezklasa familio, kie August Strindberg naskiĝis en la jaro 1849, regis absoluta gepatra aŭtoritato kun apogo de severaj religiaj moralkonceptoj, kaj la infano ekhavis la ideon ke ĝi havas nur

devojn kaj neniujn rajtojn, ke ĝi staras plej malsupre sur ranga ŝtuparo, kie ĉiu estas regata de tiu kiu staras unu ŝtupon pli supre.

Kiam Strindberg en la aĝo de proksimume 35 jaroj komencis verkisian aŭtobiografion, kiun li aludante al sia patrino nomis „*La filo de la servistino*”, li diris i.a. pri sia frua infanaĝo: „Liaj unuaj impresoj kiel li poste memoris ilin, estis timo kaj malsato. Li timis la mal-lumon, timis batojn, timis malkontentigi ĉiujn, timis ke li falos, vundos sin, malhelpos iun. Li timis la pugnojn de la fratoj, la taŭzon de la servistinoj, la riproĉojn de la avino, la vergaĵon de la patrino kaj la kanbastonon de la patro. Li timis la servsoldaton de la generalo, kiu staris en la malsupra vestiblo kun pintkasko kaj kurba tranĉilo; li timis la domadministranton, kiam li ludis ĉe la balaaĵujo en la korto, li timis la regnan jurkonsilanton, kiu posedis la domon. Super li regantoj kun privilegioj, ek de la aĝoprivilegioj de liaj fratoj ĝis la plej alta tribunalo de la patro, super kiu tamen staris la domadministranto kiu taŭzis kaj ĉiam minacis per la domposedanto, kiu plejparte estis nevidebla ĉar li loĝis en la kamparo kaj eble pro tio estis plej timata. Sed super ili ĉiuj, eĉ super la servsoldato kun la pintkasko, staris la generalo, ĉefe kiam li eliris en uniformo kun triangula ĉapelo kaj plumaĵoj. La infano ne sciis kiel aspektas reĝo, sed ĝi sciis ke la generalo iros al la reĝo. La servistinoj ankaŭ kutimis rakonti pri la reĝo kaj simiis lin (t.e. faris grimacojn). La patrino ankaŭ ofte diktis la vesperan preĝon al Dio, sed ĝi ne povis ekhavi klaran koncepton pri Dio, nur komprenis ke li necese staras pli alte ol la reĝo.

„Kredeble tiu timo ne estis io stranga por la knabo, se ne tiuj ŝtormoj kiuj trafis la gepatrojn dum li kuŝis en la patrina ventro havis specialan influon al li. Ĉar multe ŝtormis. Tri infanoj estis naskitaj antaŭ la edziĝo, kaj Johano naskiĝis jam komence de la geedzeco. Verŝajne li ne estis dezirita infano, des malpli ĉar bankroto antaŭiris lian naskiĝon tiel ke li venis en la mondon en ruinigita, antaŭe bonhava hejmo, kie nun troviĝis nur lito, tablo kaj du-tri seĝoj.”

Kiujn ajn trograndigojn ni devas demarĉandi de la malgaja infanaĝa priskribo en „*La filo de la servistino*”, tiu verko tamen estas la ĉefa ŝlosilo al la scio pri la psiko de Strindberg. Per sia genia celtrafeco li anticipas kaj atestas la rezultojn de la moderna psikoanalizo kaj aliaj nuntempaj konceptoj, kiuj en la impresoj kaj spertoj de la infano vidas ion por la tuta vivevoluo decidan.

Je la aĝo de 18 jaroj venis Strindberg kiel nova studento al la universitato de Uppsala, sed lia studado tie fariĝis fragmenta kaj rapsodia. Li nur malfacile povis alkiuti al la ordinara universitata ordo kaj fine forlasis la urbon sen trapasi iun ekzamenon. Nun li provis multajn diversajn profesiojn, kiel popollerneja instruisto, gubernisto, ĵurna-

listo, bibliotekisto. Tute subite kiel ĉiam li decidis fariĝi aktoro kaj kontraŭ ĉiu atendo sukcesis ekhavi permeson fari provon ĉe la Drama Teatro en Stockholm. Li debutis kiel nobelo en la tragedio „Maria Stuart” de Björnstjerne Björnson, kaj lia sola repliko estis la jena: „La lordoj sendis tien ĉi intertraktanton kun provokoj al la grafo de Bothwell”, sed li finis kun honoro sian modestan taskon. Kiam li post ne longe ricevis pli grandan rolon, sufiĉis nek la entuziasmo nek la ambicio, kaj li tute fiaskis. La okazaĵo tamen estis ne sensignifa. Malespera kaj senkuraĝa pro la malsukceso li subite ekkonsciis sian vivotaskon: fariĝi dramisto, kaj en kvar tagoj li finfaris sian unuan teatraĵon.

La vojo de Strindberg al agnoskiĝo kaj sukceso en la teatro tamen estis kaj longa kaj peza. Plej multe lin ĉagrenis, ke lia unua granda dramo, „*Magistro Olavo*”, kiun li plenumis jam en 1872, ne estis prezentata al la publiko. Ĝi estis eldonita nur post ses jaroj kaj tiam en tute nova formo, en versoj, dum la unua proza teksto ne aperis antaŭ 1880 kaj estis unuafoje prezentata sur la scenejo la postan jaron. „*Magistro Olavo*” estas historia dramo, kies agado okazas en la mezepoko, sed la pritraktitaj problemoj estis same aktualaj por la aŭtoro kaj liaj samtempuloj. La ĉefan rolon ludas Olavo Petri, sveda disĉiplo de Martin Luther, kiu helpis la svedan reĝon Gustavo Vasa plenumi la reformacion en Svedlando, kaj Strindberg priskribas lin kiel batalanton por libereco kaj justeco kontraŭ la religia tiraneco de la katolika eklezio. *Magistro Olavo* estas la idealista revoluciulo de sia tempo. Lin trafas la anatemo de la eklezio, ĉar li predikas la ideojn de Luther. Sed ankaŭ la popolo, kiun li volas liberigi, respondis al la reformanto kaj liaj novaĵoj per ŝtonĵetado. Eĉ lia propra patrino neas lin kaj konsideras lin kiel herezulon. La sola homo, kiu protektis lin, estas la reĝo, kaj kun ties permeso kaj subteno *Olavo* plenumas sian faron.

Tio kio plej interesis Strindberg tamen estis tragedia epizodo en la vivo de Olavo Petri, nome ke li poste estis kondamnata de la reĝo al mortpuno, i.a. kaŭze de scio lia pri konspiro kontraŭ la reĝo; li fine estis amnestiata. Strindberg eluzas tion por prezenti Olavon kiel tragikan personon. Kiam la reformanto malkovras, ke Gustavo Vasa fuŝis la reformacion por servi al liaj propraj, profanaj celoj, li estas logata en la regnoperfidan komploton kaj estas arestata. La granda lasta sceno montras Olavon ĉe la benketo de malhonoro en la katedralo. Laŭeble longe li restas la neŝancelebla spitulo, ĝis la delegito de la reĝo serioze admonas lin forpeli la idealistajn himerojn kaj pensi pri sia edzino, kiu staros tute sola en la mondo. Tiam *Olavo* rezignas, pardonpetas kaj ricevas amnestion.

Ke Strindberg lasas Olavon ŝanceliĝi kaj fine savi la vivon per kom-

promiso estis tute konforma al tiu karaktero, kiun li volis doni al sia heroo. La verkisto mem diras, ke li deziris fari la ĉefrolon portreto de si mem „tia kia li post multjara ekzameno de sia konscienco trovis sin esti”. Sed ankaŭ du aliaj personoj de la dramo havas certajn trajtojn komunajn kun la verkinto. La reĝo estas viro de realaĵoj, kiu ne hezitas forferi siajn idealojn por atingi praktikan celon. En Gustavo Vasa, Strindberg — kiel li mem diras en komento — „deseĝnis sin tia kia li deziris esti” je tiuj okazoj, kiam li suferis pli multe ol alie pro sia interna disiĝo. Kiel alian kontraston al Olavo li fine metis fanatikan kaj persistan revoluciulon kaj anabaptiston, Gert la literopentristo, kiu konstante instigas sian bofilon, la ŝanceliĝeman Olavon, al novaj faroj. En la lasta sceno estas Gert, kiu — mem survoje al la eŝafodo — krias al Olavo la vorton „Apostato!” (malfidelulo). Alia reago de Gert, per kiu li volas stimuli Olavon al radikala reformagado, ankoraŭ sonas fajra kaj inspira kaj kvazaŭ akcentita de la okazaĵoj de nia tempo: „Estis la aero kiu kriis, estis neniŭ kiu kriis; sed la voĉo altiĝas kaj ekventego disflugas; ĝi transiras la Alpojn, ĝi muĝas super Fichtelmontaro, ĝi vekas la Baltan maron kaj la eho resonas de la bordoj: milobligita la krio iras tra la mondo: libereco! libereco! — Aŭskultu! Ne ligu la spiritojn per katenoj! Ne forgesu vian altan celon: anima vivo kaj anima libereco!”

Kiam „*Magistro Olavo*” finfine estis prezentata kaj per tio konata de la publiko, ĝi preskaŭ kaŭzis sensacion. Tia freŝeco rilate al la priskribo de la personoj, tia drameca vivo, tia aŭtentika loka koloro kaj tia flua parola lingvo antaŭe estis preskaŭ nekonataj aperoj en sveda literaturo.

La forta bezono de libereco kaj la interna maltrankvilo de Strindberg ĉiam pelis lin de unu rigardo en alian, de unu bataalkampo al alia, kie li mem kaj aliaj estis vundataj kaj sangis. Per tio lia vivo fariĝis dramece vigla kaj tute mankis neefikaj punktoj. Senĉese li amasigis ĉirkaŭ si bruleman materialon, ĝis la flamoj subite leviĝis ĉielen. Ke li mem kaj aliaj estis bruldifektitaj ne retenis lin, la veturo nur pluiris dum ritma ondado inter espero kaj elreviĝo, trofiero kaj humiliĝo. Sed Strindberg ne estis pacema migranto, vojrabisto pli vere ol pilgrimanto, militisto kun la armiloj kaŝitaj sub la migrantomantelo. Ĉar flanke de la maltrankvileco la batalemo estis la dominanta trajto de lia naturo. Tra lia tuta verkado iras la koncepto pri la vivo kiel potencobatalo. La socia vivo estas por li batalo inter individuo kaj kolektivo aŭ inter la supera klaso kaj la proletaro, la amo estas duelo inter viro kaj virino, la religio estas luktado inter la homoj kaj tio kion li nomas „la potencoj”. Kaj la celo de la batalo por li ĉiam estas la sama: defendi sian liberecon, sian personecon, sian suverenecon kontraŭ ĉiu influo aŭ de-

penda rilato. Li estis evidenta egocentrismo, kiu ĉiam konsideris sin mem kiel la centron de la monddramo ondadanta ĉirkaŭ li, aranĝita ĝuste por li.

Jam antaŭ ol la batalo pri la dramo „Magistro Olavo” estis finita, Strindberg estis preta elĵeti novan bruligan torĉon. Mi aludas la libron „*La ruĝa ĉambro*”, la unua granda socia romano de la sveda belestro. La materialon Strindberg kolektis dum siaj krudegaj jaroj kiel ĵurnalisto kaj kritikisto en la ĉefurbo, kiam li i.a. kamaradis kun artista bohemularo en tiu ĉambro en ankoraŭ ekzistanta restoracio, kiu donis sian nomon al la romano, kaj kun koterio de medicinistudentoj, kies cinika scienca ĵargono respeguliĝas en la romano. La personaro konsistas el du malamikaj partioj: la ĝismorte malsataj artistaj malregululoj, kiuj estas la idealistoj de la romano, kaj la bone nutritaj filistroj, kiuj estas la senskrupulaj realistoj. La centra figuro estas juna literaturisto Arvid Falk, kiu trapasas proksimume la saman evoluon kiel magistro Olavo. En la komenco de la libro li elrompiĝas el la socio kaj trovas sian ĝustan lokon inter la bohemuloj, sed je la fino li — cetere same kiel Strindberg mem — kapitulacis kaj envicigis sin inter la burĝoj, kvankam ne tute sen konsciencaj riproĉoj.

Tiu romano celis malkaŝi tiun aĝiotan periodon, kiu sekvis post la grava liberala venko kaj la parlamenta reformo en Svedlando dum la 60-aj jaroj. La diversaj ĉapitroj montras per ekzemploj, kiel ĉie regas samspeca oportuno kaj ĉarlataneco, en parlamento kaj administrajtoj, en komerco kaj asekura organizo, en religio kaj bonfarado, en gazetaj kaj teatraj rondoj. Laŭ Arvid Falk la tuta socio estas „reto de mensogoj”. Por ni nuntempaj legantoj la socia kritiko ŝajnas iomete malfreŝa kaj eble iom tro karikatura, sed kio perdis nenion dum la pasintaj jardekoj estas la amuzaj medipriskriboj kaj la komikaj situacioj. Fame konata ekzemple estas la enkonduka ĉapitro, kie Strindberg kun eminenta faka sperto rakontas, kiel bestoj kaj kreskaĵoj printempan tagon vekigis al nova vivo en ĝardeno alte supre de la akva enveturejo al Stockholm:

„Estis vespero, komence de majo. La parketo sur la altaĵo Mosebacke ankoraŭ ne estis malfermita por la publiko kaj la florbedoj ankoraŭ ne prifositaj; la galantoj suprenigis sin tra la foliamasoj de la pasinta jaro kaj ĝuste estis finantaj sian mallongan agadon por doni lokon al la pli delikataj safranfloroj, kiuj trovis rifuĝon sub senfrukta pirarbo; la siringo atendis sudan venton por ekflori, sed la tilioj ankoraŭ oferis en siaj nefenditaj burĝonoj amfiltron al la fringoj, kiuj ekkonstruis siajn likenkovritajn nestojn inter trunko kaj branĉo; ankoraŭ neniu homopiedo surpaŝis la sablajn vojetojn post la foriĝo de la lastvintra neĝo, jen kial la bestoj kaj la floroj tie vivadis senĝene. La paseroj kolektis

ĉifonaĵojn, kiujn ili poste kaŝis sub la tegolojn de la navigada lernejo; ili interbatalis pri la splitoj de la raketingoj de la lasta aŭtuna artfajraĵo, ŝirkolektis la pajlon de sur junaj arboj, kiuj la antaŭan jaron liberiĝis el la apuda plantejo — kaj ili rimarkis ĉion! Ili trovis ĉifonojn en la laŭboj, kaj el inter la splitejoj de benkpiedo sukcesis eltiri harfalaĵojn de hundoj, kiuj ne plu batalis tie post la Jozefina tago pasintjara. Estis vigla vivo kaj kverelo.”

Poste la poeto lasas nin sekvi la ludon de la sunradioj kaj la vojon de la printempa vento inter insuloj kaj ŝeroj¹⁾ en la urbon, tra stratoj kaj pordoj, supren laŭ muroj kaj preĝejoj turoj, kaj li daŭrigas:

„Ĉio faris impreson pri vivo kaj vigleco, kiuj ŝajnis vekis la energion de juna sinjoro, kiu envenis la ĝardenon, ĉar lia vizaĝo nun alprenis esprimon de obstino kaj vivĝojo kaj decidemo, kaj kiam li klinis sin super la barieron kaj rigardis malsupren sur la urbon sub siaj piedoj, li faris tion kvazaŭ rigardante malamikon; liaj naztruoj larĝiĝis, liaj okuloj flamis kaj li levis sian pugniton manon, kvazaŭ li volus provoki la kompatindan urbon aŭ minaci ĝin.

Nun oni sonorigis la sepan en Katarina, kaj Maria akompanis per sia splena soprano, kaj la Katedralo kaj la Germana preĝejo aliĝis kun siaj basoj, kaj baldaŭ la tuta spaco tremis de la sonoro de ĉiuj urbaj sonoriloj, kiuj batis la sepan; sed kiam ili silentiĝis, unu post la alia, ankoraŭ aŭdiĝis tute fore la lasta, kantante sian pacplenan vesperkanton; ĝi havis pli altan tonon, pli klaran tinton kaj pli rapidan takton, ol la aliaj — ĉar ĝi havas tian! Li aŭskultis kaj provis eltrovi, de kie venas la sono, ĉar ĝi vekis memorojn en li. Tiam lia mieno iĝis tiom mola kaj lia vizaĝo esprimis la doloron, kiun infano spertas, kiam ĝi rimarkas, ke oni lasis ĝin sola. Kaj li estis sola, ĉar liaj patro kaj patrino kuŝis malproksime en la tombejo de Klara, de kie ankoraŭ aŭdiĝis la sonorilo, kaj li estis infano, ĉar li kredis ankoraŭ ĉion, kaj veron kaj legendojn.”

La unua ĉapitro de „*La ruĝa ĉambro*” estas la preludo ne nur al tiu romano sed al la tuta naturpriskriba verkado de Strindberg. Jam kiel knabo dum pafista ekzerco en la ekstrema ŝeraro li entuziasmiĝis de la arhipelago, kaj tiu amo estis daŭranta tra lia tuta vivo. Tie li pasigis multajn somerojn, kaj tie li lokis la scenejon de pluraj el siaj rakontoj.

Speciale intense Strindberg rememoris tiun paradizon de sia junaĝo dum siaj mallumaj kaj amaraj jaroj eksterlande, kaj en Germanujo li verkis en 1887 sian romanon pri la loĝantoj de la arhipelaga insulo Hemsö, „*La Hemsöanoj*”, kiu ĝenerale estas rigardata kaj kiel lia plej klasike harmonia verko kaj kiel lia plej bonhumora romano. Neniam

1) malpli alta ol insulo; jen kaj jen sub la marakvo.

antaŭe li estis tiel multe humoristo kaj tiel malmulte satiristo kiel en tiu libro. Malgraŭ la granda distanco rilate al tempo kaj loko — lia memvola ekzilo jam daŭris kvar jarojn — lia naturpriskribo floras kun ĉarma freŝeco, kaj li montras preskaŭ nekredible detalan memoran scion pri la vivo kaj laboro de la arhipelaga loĝantaro. Permesu al mi citi la komencon de la libro, kie Strindberg donas la unuan prezentadon de la ĉefpersono, la servisto Carlsson:

„Li venis kiel neĝoblovado aprilan vesperon kaj portis argilan kruĉon per zonrimeno ĉirkaŭ la kolo. Clara kaj Lotten (du bienservistinoj) venis kun remboato por akcepti lin ĉe la kajponto de Dalarö, sed daŭris eternan tempon antaŭ ol ili eniris la boaton. Ili devis iri al la vendejo por aĉeti barelon da gudro kaj al la apoteko por havi hidrargan ŝmirajon por la porko kaj al la poŝtoŝtupo por unu poŝtmarko, kaj ili devis iri al la maljunulino Fia por prunti la kokon, kaj fine ili venis al la gastejo, kie Carlsson regalis per kafo kun kukoj. Kaj poste ili finfine venis en la boaton, sed Carlsson deziris direkti kaj tion li ne scipovis, ĉar li neniam antaŭe vidis tian boaton, kaj pro tio li kriis ke ili hisu la antaŭvelon, kiu ne ekzistis. Sur la dogana ponto staris pilotoj kaj pedeloj kiuj mokridis je la manovro, kiam la boato iris ventantaŭe kaj velis al la golfeto, nomata la Salsako. „Aŭskultu! Estas truo en la boato!” kriis pilota lernanto tra la vento. „Ĝin! Ĝin!” kaj dum Carlsson serĉis la truon, Clara forpuŝis lin kaj prenis la direktilon, kaj per la remiloj Lotten sukcesis gajni venton, tiel ke ili nun pasis trans la golfon tre rapide. — Carlsson estis malgranda kvarangula Värmlandano kun bluaj okuloj kaj nazo kurba kiel hoko. Vigla, ludema kaj scivolema li estis, sed la maraferojn li tute ne komprenis. Kaj verdire li estis vokata al Hemsö por prizorgi kampojn kaj brutojn, pri kiuj neniu volis okupi sin post kiam la maljunulo Flod mortis kaj la vidvino estis sola sur la bieneto. — Sed kiam Carlsson komencis eldemandi la junulinojn pri kondiĉoj kaj cirkonstancoj, li ricevis vere insularanajn respondojn: Tion mi ne *scias!* Tion mi *ne* povas diri! Tion mi *tute* ne *scias!*”

Sub la sunbrilo de la surfaco ankaŭ en tiu gaja romano aperas la senindulga batalo por la ekzisto, i.a. kiel persista luktado inter la enmigrinto Carlsson kaj la originaj loĝantoj de la insulo. Komence Carlsson superregas dank' al sia kunnaskita ruza lerteco, sed fine li tiras la mallongan pajleron pro tio ke li ne sufiĉe bone konas sian novan medion. La libro abundas je komikaj figuroj, ekz. la vidvino Flod, al kiu Carlsson pli poste edziĝas, ŝia filo Gusten, kiu plejparte ĉasas kaj fiŝkaptas, servistoj kaj servistinoj kaj alkoholisma pastro, kiu malgraŭ sia dekadenco apenaŭ vekas indignon sed aperas kiel natura produkto de sia medio. Demokrata tendenco kiel en la antaŭaj libroj de Strind-

berg ne estas klare rimarkebla spite la temon, sed la vidpunkto estas pure naturalisma. Eĉ la naturo, kiun Strindberg plej ofte rigardas de ĝia plej idilia flanko, montriĝas en sia timiga majesto en la grandioza fina ĉapitro, kiam Carlsson erariĝas en la mallumo kaj pereas en la maro dum la glacirompiĝo.

Samtempe kun siaj bonhumoraj, idiliaj rakontoj el la marborda insularo Strindberg verkas akre naturalismajn dramojn, kiujn karakterizas senlima virinmalamo. Ke la virino kaj la amo okupis tiel grandan lokon en la vivo kaj verkado de Strindberg ĉefe dependas de du kvalitoj, kiuj intime rilatis al lia sentema kaj maltrankvila karaktero, nome lia bezono de amemo kaj lia forta voluptemo. Ĉiuj liaj tri edzeco pleniĝis de jen nedirebla feliĉo kaj jen profunda disiĝo, kaj ĉiuj finiĝis per katastrofo kaj eksedziĝo. Literatura kritikistino faris la jenan analizon:

„La virino, kiun li povus ami, devus esti ĉielo kaj infero — dolĉa kaj virga sed ankaŭ plena de fajro kaj pasio, neklera sed ankaŭ kapabla konkuri kun li intelekto, preta kontraŭdiri lin kaj preta prizorgi ke la ĉiutaga kunvivado havu sian pikantecon kaj sian eksplodan eksciton kaj ne fordormiĝu en banalan rutinon; ŝi devus samtempe havi kaj malhavi personecon — ŝi devus esti malplena ujo, sopirante esti plenigata de la fluoj de lia spirito kaj plena ujo, el kiu li povu trinki malvarmon por sia fajro kaj stimulon por sia malstreĉo, ŝi devus esti la polvo sub liaj piedoj kaj la stelo en la ĉielo — ŝi devus esti lia konstanta sekca objekto kaj tamen posedi mil dolĉajn sekretojn.”

Sian unuan grandan kontribuon al la debato pri la virino- kaj edziĝoproblemaro Strindberg faris per la novelaro „*Edziĝo*”, kiu kaŭzis grandegan sensacion kaj eĉ alportis al la verkinto leĝan persekuton pri blasfemo. La longedaŭra proceso tamen finiĝis per malkondamno. En tiu libro Strindberg ankoraŭ havis favoran opinion pri la edzeco, kiun li multe laŭdis, kaj flanke de akuzoj kaj polemiko ni trovas plurajn ekzemplojn pri rozkolora idilio. Kvankam Strindberg poste estis evoluonta al speciala priskribanto de la edzeca infero, ni ne forgesu, ke li samtempe estis la eltrovinto de tute nova speco de realisma edziĝa poezio en sveda literaturo. Same bone kiel li povis esti inspirita de blua ĉielo kun blankaj nubetoj, li povis krei poezion el blua infanveturila kapoto kun blankaj laktomakuloj.

Jam en la dua parto de „*Edziĝo*” la kritiko al la virino pliakriĝis, kaj ĝi kulminis en vico da naturalismaj dramoj, kiel „*La patro*”, „*La antaŭmorta danco*” kaj „*Fraŭlino Julie*”. La lastmenciita tragedio, kiu cetere aperis en esperanta traduko jam en 1908, ĝuste nun estas aktuala pro filmo kaj baleto, kiuj baziĝas sur la teatraĵo. Tiu dramo pri juna nobelino, kiu permesas al la lakeo de ŝia patro malvirgigi

ŝin kaj poste mortigas sin mem, estas evidente influita de la franca naturalismo kaj ties emo rigardi la individuon kiel nerespondan produkton de heredo kaj media influo. Por Strindberg la dramo estis ilustraĵo de la darvinismaj teorioj pri la batalo por la ekzisto: la plebano Jean kiel la plej forta apartenas al la estonteco, dum Julie, la lasta misbranĉido de degenerinta aristokrata familio, pereas. El teatroteknika vidpunkto „Fraŭlino Julie” estas lia plej radikala naturalisma eksperimento pro tio ke li provas atingi plenan iluzion de realo sur la scenejo, kaj lia metodo estas kunpremi la agadon al du tri horoj kaj nur unu ĉambro, limigi la personaron al tri homoj kaj uzi tian interŝanĝon de replikoj, ke ĝi per sia rapida alternado en virtuoza maniero respegulas la ekscititan animstaton de la parolantoj.

La majstra kapablo de Strindberg per kelkaj tiroj de sia krajono priskribi situacion aŭ medion montriĝas en liaj romanoj kaj dramoj, en liaj noveloj kaj poemoj. Por doni unu ekzemplon pri tiu lerteco mi estas devigata elekti unu el liaj plej mallongaj rakontoj, noveleton el la libro „Fabeloj”. Ĝia titolo estas „Duonfolieto da papero”, kaj ĝin tradukis antaŭ multaj, multaj jaroj nia esperanta pioniro kaj akademiano Paul Nylén:

„La lasta pakveturilo de loĝŝanĝo ĵus foriris; la eksluinto, juna viro kun funebra krepo ĉirkaŭ la ĉapelo, ankoraŭ unu fojon marŝis tra la loĝejo por vidi, ĉu ion li forgesis. — Ne, li nenion forgesis; tute nenion; kaj jen li iris en la antaŭĉambron, firme decidinte ne pensi plu pri tio, kion li travivis en tiu ĉi loĝejo. Sed tie, en la antaŭĉambro, apud la telefono, estis duonfolieto da papero fiksita per najletoj; kaj ĝi estis plenskribita per diversmanaj skriboj, unuparte nete per inko, aliparte malnetskribe per krajono aŭ ruĝkrajono. Tie ĝi sin prezentis, tuta tiu ĉi bela historio, kiu estis traludata en la mallonga tempo de du jaroj; ĉio, kion li volis forgesi, tie staras; fragmento de homa vivo sur duonfolieto da papero.

Li prenis la folieton; ĝi estis tia sunflava malnetaĵpapero, kiu brilas. Li metis ĝin sur la plataĵon de la kahela forno en la salono. Unua troviĝis ŝia nomo: Alice, la plej bela nomo kiun li tiam sciis, ĉar ĝi estas la nomo de lia fianĉino. Kaj la numero 15 11. Ĝi ŝajnis kva-zaŭ numero de himno en preĝejo. Poste estis vorto: La Banko. Tio ĉi estis lia laboro, la sankta laboro, kiun donis la panon, la hejmon, la edzinon, la fundamenton de la ekzistado. Sed ĝi estis trastrekita; ĉar la banko ruiniĝis, sed li estis savita en alian bankon, tamen post mallonga tempo de maltrankvilo.

Jen ĝi proksimiĝis. La florvendejo kaj la luigisto de veturĉevaloj. Tio ĉi estis la fianĉiĝo, kiam li havis la poŝon plenan je mono. — Poste: la meblovendisto, la tapetisto: li pretigas geedzan hejmon. La

oficejo de transportisto: ili loĝiĝas. La biletdisdonejo de la Opero: 50 50. Estante novedziĝintaj ili vizitis la Operon dimanĉe. Iliaj plej bonaj horoj, kiam ili mem sidas silente kaj renkontas unu la alian en beleco kaj harmonio en la fabellando trans la kurteno.

Jen sekvas vira nomo, kiu estas forstrekita. Estis amiko, kiu atingis specialan altecon en la socio, sed kiu ne povante portadi la feliĉon ekfalas, nehelpeble, kaj devis foriri malproksimen. Tiel rompebla tio estas! Tie ĉi io nova ŝajnas esti enveninta en la vivon de la geedzoj. Estas skribite, per virina mano kaj krajono: „La Sinjorino”. Kiu sinjorino? — Jes, tiu kun la granda mantelo kaj la afabla simpatia vizaĝo, kiu venante tiel silente neniam eniras tra la salono sed uzas la vojon tra la koridoro en la dormoĉambron. — Sub ŝia nomo troviĝas Doktoro L. Jen vidiĝas unuafoje nomo de parenco. Oni legas: „Panjo”. Estas la bopatrino kiu, diskrete restinta malproksime por ne ĝeni la novgeedzojn, sed nun alvokata en la momento de neceseco, alvenos kun ĝojo, ĉar oni ŝin bezonas.

Tie ĉi komencas granda skribaĉo per bluaĵo kaj ruĝaĵo. La servistmaklerejo: la ĉambristino lasis la servon, aŭ ankoraŭ nova servistino estas dungota. La apoteko. Hm! Mallumiĝas. La laktovendejo. Oni mendas lakton, sentuberklan. — La spicobutiko, la viandejo k.t.p. La mastrumadon oni komencas prizorgi per telefono; sekve la dommastrino ne estas en sia loko. Ne! ĉar ŝi restadas en la lito. — Kio poste sekvis, tion li ne povis legi, ĉar komencis malklariĝi al liaj okuloj, tiel kiel okazas sendube al dronanto sur la maro, kiam li devas vidi tra la sala akvo. Sed tie estis legata: La enteriga oficejo. Tio ĉi parolas ja sufiĉe! — Unu pli grandan kaj unu malgrandan, subkomprenite ĉerkon. — Poste nenio plu estis!

Sed li ekprenis la sunpaperon, kisis ĝin kaj metis ĝin en sian brustpoŝon. — En du minutoj li travivis du jarojn de sia vivo. — Li ne estis kurbigita, kiam li eliris: kontraŭe li portis alte sian kapon, kiel feliĉa kaj fiera homo, ĉar li konsciis, ke li estas posedinta tamen la plejbelajn. Kiom da mizeruloj, kiuj ne posedis!”

Povus esti multe, multe pli por diri pri la vivo kaj la verkado de Strindberg — pri liaj historiaj dramoj kaj noveloj, en kiuj li kutime esprimas siajn proprajn pensojn kaj ideojn tra la buŝoj de la historiaj personoj — pri liaj lastaj fabeldramoj, kie sonĝo kaj realo miksiĝas en efekta kaj sugestia maniero — pri lia propra teatrejo en Stockholm, la Intima Teatro, kiu dum sia trijara ekzisto invitis al unuaj prezentadoj de 16 el liaj dramoj — pri lia pentrista agado kun rokoj, ondoj kaj nuboj kiel specialaĵoj — pri liaj alhemiaj provoj kaj liaj lingvosciencaj fantaziaĵoj — pri lia batalo kontraŭ halucinacio kaj monomanio kaj kontraŭ tio kion li nomis „la potencoj” — pri lia reli-

gia konvertiĝo kaj tiu disŝiranta anima krizo, kiun li malkaŝe priskribis en la libro „Infero” k.t.p. Sed la tempo ne permesas tion.

Jam longe antaŭ sia morto en la jaro 1912 August Strindberg akiris unikan pozicion en la sveda literaturo kaj eĉ atingis internacian famon. Sed kompreneble la prijuĝoj pri tiel komplikita kaj kontraŭstoplena homo estis tre variaj. Neniu ja povis serioze nei tiajn kvalitojn kiel lia neelĉerpebla kreipovo kaj lia senlaca batalemo, lia falkokula observokapablo, lia marfreŝa natursento kaj lia lingva novkreado. Kontraŭ ĉio tio kontrastas ĉefe lia sendisciplina sentoposado, kiu ĉiam logas lin en la densaĵojn de paradoksoj, malkonsekvencoj kaj fine ankaŭ superstiĉo. Tio evidente interdependas kun lia psika malharmonio. Karakteriza estis lia forta malamo, kiu esencaparte konsistigas la eksplodemon de lia verkado. Tiu grava loko, kiun la malamo okupas en lia mondkoncepto, ne plu ŝajnas tiom troigita kaj absurda. Tiuj barbaraj pasioj, kiuj malplaĉis al liaj samtempuloj, pli malfrue en nia tempo libere batalis sur la granda mondareno; lian malegalan batalon kontraŭ ili nun transprenis la tuta homaro. Ni eĉ povas diri, ke tiu enrigardo en la psikologian meĥanisman de timo, malamo, ĉiama pravemo kaj venĝo, kiun Strindberg prezentas en siaj verkoj kun senkompara malkaŝemo, donis al lia verkaro novan aktualacon. Sed ĝi ankaŭ malkovras la profundan suferadon, al kiu kondukas tia monomanio. Kaj el la suferado nevenkeble leviĝas tiu sopiro al repaciĝo kaj homa konkordo, kiun ni malgraŭ ĉio perceptas kiel la plej interne vibrantan tonon en la verkaro de August Strindberg.

4089.2

KELKAJ TEZOJ DE LA AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

2) Esperanto devas resti simpla helplingvo, precipe por nestudintaj personoj kaj por la orientaj popoloj. Alie ĝi ne havus sencon kaj povus cedi al unu el la grandaj naciaj lingvoj. — La Zamenhofa Esperanto estas genia kreaĵo kun propra strukturo kiu kombinas la preferojn de la fleksiaj lingvoj kaj de la kunmetaj lingvoj. Ĝia karaktero kiel helplingvo estas esence ligita kun la principo de la element-kunmetado. Bedaŭrinde, pro la nuntempa interrompo de nia movado malantaŭ la Fera Kurteno, la influo de la slavaj kaj aziaj esperantistoj mankas, kaj tial superiĝas la koncepto de la okcidentanoj, kiuj influite de la pli potenciĝinta angla lingvo, tro emas apliki al Esperanto ties memstarajn kontraŭprincipajn vortemblemojn.

Kelkdekoj da novaj vortoj en Esperanto, kiujn cetere novuloj ne devus lerni, kompreneble ne endanĝerigas la sistemon. Sed ekkoninte la principon, ni rajtas kaj devas averti, ke oni ne malĝusttendence kaj facilanime enkonduku novajn vortojn superfluajn, por ke la vortaro de Esperanto ne fariĝu pli granda kaj pli neregula ol tiu de iu nacia lingvo.

3) Laŭ nia opinio Esperanto ja estas vivanta lingvo, sed ne libere vivanta kiel sovaĝa kreskaĵo en arbaro, sed ame plantita kaj flegenda kiel fruktarbeto en ĝardeno. La esperantistoj devas per taŭgaj organoj gardi, kontroli kaj reguli la evoluon de la lingvo, por ke ĝi ne miskresku preter sia celo, facile servi al ĉiuj. Esperanto-instruistoj kaj vizitantoj de Esp.-kongresoj nedubeble povas konstati, ke Esperanto jam en sia nuna formo prezentas certajn lingvajn malfacilaĵojn al la plimulto de la esperantistoj. Kial plimalfaciligi ĝin per ignoro de la kunmetebleco kaj enkonduko de superfluaj radikoj?

4) La esperantistaj vortaristoj devas laŭ nia opinio ne nur registri neologismojn, ofte nur efemere aperintajn, sed kritiki, prijuĝi kaj bone marki ilin. Precipe ni opinias, ke la Plena Vortaro devus pli kritiki rilate al novaj vortoj, uzante la atributon „evitinde” antaŭ ĉio en kazoj, kiam du aŭ pluraj novvortoj aperas por unu sama ideo. En Esperanto ne devus ekzisti sinonimoj. La jam ekzistantajn ni ne volas „kondamni”, sed ni deziras pliajn eviti (ekz. strando aŭ plaĝo, grapolo aŭ traŭbo).

(La AEI krome donis kelkajn tezojn kun polemika enhavo. Red.)

413.164 : 389.6(100)

LA INTER-SIMILIGO DE NACIAJ FAKTERMINOJ EN LA TEKNIKA KOMITATO ISO/TC 37 „TERMINOLOGIO”¹⁾

Raporto de R. HAFERKORN

kun traduko de la plej grava ĉapitro el la lasta publikigaĵo de d-ro inĝ. Eugen Wüster pri la *internacia lingvonormigo en la tekniko*.

Enkonduko. - La ĉisubaj linioj celas atentigi la lingvistojn inter la Esperantistoj pri la rolo, kiun „*Interlingua/Occidental*” ludas en la laboro de la normigaj fakuloj: En la normigaj komisionoj oni unue celas adapti la eksteran formon de nacilingvaj noci-nomoj. Farante tion, la deveno - plej ofte latina aŭ greka - devas esti atentata; ĉi tiu plej ofte estas komuna al la apartaj lingvoj. Estas necese formi la lingvohistorie ĝustan *normformon* de ĉiu termino, kiu laŭeble estas liberigata el nacia idiotismo (ekz. anglicismo, germanismo). Kio validas por ĉiu nacilingva fremdvorto, ankaŭ validas por la Esperantotermينو. Sur tiu ĉi metodo baziĝas la „*Interlingua*”-sistemo kaj la *IALA-Vortaro*.

La ĉisube citota artikolo de Wüster kaŭzis multe da miskompreno; leginte ĝin la esperantistoj unue miregis pri la stranga konduto de Wüster, kiu unuflanke estas famkonata kiel aŭtoro de la bonega „*Enciklopedio Vortaro de Esperanto*” kaj eminenta spertulo pri nia lingvo, aliflanke ŝajne pledas por „*Interlingua*” en la rondo de la normigaj fakuloj. Sed la sekvantaj linioj forigos tiun ŝajnan kontraŭecon; ili montros ke malgraŭ ke la normigaj fakuloj uzas „*Interlingua*”-terminojn kiel unuan ŝtupon de la adaptado, Wüster nun same kiel antaŭe opinias ke Esperanto estas la plej taŭga interkomprenilo koncerne la *komunan* lingvon inter homo kaj homo.

¹⁾ Vidu ankaŭ p. 34.